# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 9 F. C. C. P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1978 — N° 69

# LABORKUNSIDO EN NARBONO

Niaj narbonaj geamikoj,kiujn ni dankas pro la bona aranĝo, invitis la ĉijaran aŭtunan laborkunsidon de la federacia komitato ĉe la urba junulardomo.

Venis kvardeko da gesamideanoj el la tuta federacio inter kiuj 13 el la federaciaj komitatanoj.

Je la 9 h 30,S-ro Llech-Walter bonvenigis la ĉeestantojn,raportetis pri la E-agado en la sino de la federacio,la efiko de la nacia varbado-komisiono kaj atentigis pri la baldaŭa Zamenhof-tago pri kies temoj skribis H. Tonkin,Prezidanto de U.E.A. en la oktobra numero de "Esperanto".

Li aparte salutis S-ron Jean Hénin el La Canourgue (Lozère),malproksima urbo en departemento situanta sur la teritorio de nia federacio.

La unua punkto de la tagordo antaŭvidis elekton de federacia estraro sekve de renovigo (fakte senŝanĝe) de la komitato dum la lasta federacia kongreso en Sète.

Antaŭ ol sin proponi kiel kandidaton,D-ro Salan respondeculo de nia federacia ligilo, submetas du demandojn al voĉdono :

1°/ ĉu "Sudfrancia Stelo" (SFS) pluaperos ? La respondo estas "jes" laŭ la jena voĉdonrezulto : jes : 8 ; ne : 3 ; sindeteno : 1 . Notindas ke S-ro Ensuque,komitatano, ne estis ankoraŭ alveninta kiam ni pritraktis tiun punkton.

2°/ ĉu la komitato akceptas ke SFS estus nur kvarpaĝa kun la jena disdivido :

- 1 paĝo kaj duono por oficialaj informoj ;
- 1 paĝo kaj duono je la dispono de la grupoj,rakontoj,ktp..(ne plu aperos kruĉvortoj kaj desegnaĵoj) ;
- 1 paĝo (lasta) por esperantologio kaj gramatiko.

Ĉar ankaŭ tiu dua demando estis akceptita,D-ro Salan restas kandidato kaj la komitato konfirmas la federaciajn estraron kaj komitaton kiuj konsistas el :

- S-ro LLECH-WALTER , Prezidanto ;
- D-ino VIERNE, Vic-Prezidantino ;
- S-ro AMOUROUX, Sekretario ;
- S-ino NEGRON , Kasistino ;
- D-ro SALAN por la aranĝo kaj S-ro FRUS por la presado kaj dissendo de "Sudfrancia Stelo" .
- Komitatanoj : Ges-roj ANGEVIN,AUTHIER,COQUIN,DELIGNE,ENSUQUE, PELLETIER,RAYNAUD,TERRAL,VOLPELIERE.

La abonkosto por SFS restos senŝanĝa .

Dua triono de la komitato estos balotata dum nia federacia kongreso. La sorto decidis ke tiam vakos la posteno de ges-roj Frus,Llech-Walter,Pelletier,Raynaud kaj Vierne.

En Clermont-Ferrand la federacio pruntedonis 1.000,oo F al U.F.E. por ebligi la pligrandiĝon de la nacia sidejo sed, ĉar U.F.E. jam redonis al ni la prunton, ni decidis donaci 200,oo F por la "Fonduso-domo 2 " de la nacia asocio.

Kiel helpo al kreiĝanta E-grupo en Argelès-sur-Mer la federacio sendigos 50 ekzemplerojn de "Esperanto Actualités" al la respondeculo kaj pagos la fakturon.

Pri loka agado kadre kun la E - Semajno raportis :

...../.....

- MONTPELLIER = D-ino VIERNE - La grupo planas elmontron de ekspozicio de nia amiko LENTAIGNE , "Le Livre Esperanto", sur ĉefa vojo de Montpellier la 22 kaj 23-an de novembro kun invito al ĵurnalistoj por debato.
La urbestraro decidis doni la nomon de Zamenhof al nova strato. Kiam decidita estos la inaŭguro, la grupo invitos la federacianojn al partopreno .
- NIMES = S-ino VOLPELIERE : ekspozicio de E-libroj ĉe la urba biblioteko . Aperis artikoloj, foto en "Midi Libre". Reprezentanto de FR 3 ŝin vizitis? Radio dissendis intervjuon .
- PERPIGNAN = S-ro LLECH-WALTER por la "esperantista kulturcentro" : Tri kursoj okazas gvidataj de S-roj Braet, Abecassis kaj Llech-Walter.
S-ro Llech-Walter prelegis en Argelès-sur-Mer. Starigo de grupo esperantis.
S-ro AMOUROUX por la kvartala grupo "Le Moulin à Vent" : Ekspozicio la 14 kaj 15-an de oktobro. Reklamis kaj raportis la lokaj ĵurnaloj, "l' Independant", la plej legata, kun foto. Tri kursoj okazas en la kvartala lernejo gvidataj de S-roj Vialla (por infanoj 10-12 jaraj) kaj Amouroux (unuagrada kaj progresiga por plenkreskuloj).
- LA CANOURGUE = S-ro HENIN : lige kun esperantistoj en Mende bone laboras por veki intereson pri Esperanto kaj starigi grupojn .
- QUILLAN = S-ro REGNIER : Propagandekspozicio la 29-an de oktobro. Kurso sekvos. ( Ĝi okazos ĉiumerkrede : Régnier - 11, Rue de la Mairie, 11500 Quillan)


Skve de alvoko de S-ro Guillaume por kolekti reklamojn por la jarlibro de UEA kaj "Franca Esperantisto", S-ino Volpelière sciigas ke la turisma oficejo de NIMES donis principan konsenton por la jarlibro. D-ino Vierne ankaŭ zorgas pri la afero en Montpellier kaj La Grande Motte .
S-ro Amouroux legas la rezultaton de la E-ekzamenoj por la lerneja jaro 1977-1978 . Vidu la ĉi-aldonitan liston .
La kotiztabelo por la venonta jaro troviĝas sur la dua paĝo de la lasta "Franca Esperantisto". La grupoj zorgu sendi, plej baldaŭ kiel eble, la liston de kotizantoj al S-ino NEGRON kaj ĝiri la monon al la poŝta konto de la Federacio.

Post la komuna tagmanĝo, je la 14-a, ni rekuniĝis ĉe la kunvenejo.
Laŭ la propono de S-ro Hénin la venontjara federacia kongreso okazos en MENDE la 28 kaj 29-an de aprilo. Konsidere de la distanco por pluraj federacianoj, la ĉeestontaj interesuloj povos plilongigi sian restadon por turisma rondvojaĝo tra tiu vizitinda Lozère-departemento. S-roj Hénin kaj Amouroux ĝustatempe interrilatos por organizi kongreson kies programo estos tricela : labori certe sed ankaŭ veki interesiĝon pri Esperanto en tiu regiono kaj agrabligi la restadon de la ĉeestantoj.
D-ino Vierne atentigis pri kelkaj efikaj kaj tute senpagaj rimedoj por informadi pri Esperanto :
- laŭ la propono de J.L. Texier (varbado- komisiono de UFE) sin enskribigi kiel profesoro de Esperanto en la flavaj folioj de la novaj telefonlibroj en la rubriko " professeurs de langues" komprenebIe por tiuj kiuj havas telefonnumeron.
- uzi la senpagajn anoncojn de la regiona semajna gazeto "SUD".
- en ĵurnaloj kaj revuoj kiuj havas rubrikon " leterkesto de la legantoj" levigi demandojn pri Esperanto - ekzemple pere de konatulo - kaj mem respondi .
D-ino Vierne krome eksplikis kio estas la "pasporta servo" por gejunuloj, ne sufiĉe konata kaj uzata inter esperantistoj.
S-ro Deligne, nome de ĉeestanto, sugestis ke la esperantistoj vizitu publikajn bibliotekojn kiuj, kelkfoje, havante disponeblan monon volonte akirus Esperanto - librojn se la esperantistoj konsilus titolojn kaj eĉ perus la aĉeton. Tre bona ideo. Ja certe ni povas viziti bibliotekestrojn kaj ni proponi kiel peranton.
Ni aŭskultis parton de sonbendo de C. Piron altnivele argumentante por Esperanto .
Peraŭtomobila ekskurso al la tipa Gruissan metis finan punkton al tiu simpatia federacia kunveno .

Jean AMOUROUX , federacia sekretario .

## Horizontale ❋

1- Li ne devas esti dormema (R)
2- Avaja gitaro (R) - La doma estas tegenario (R)
3- Plid tuko ĝi ornamas tablon (R) - Iloj de krupieroj
4- Frapfrazo - Prefikso.
5- Eligi sonon kun vibra efekto - La maniere hipokrite
6- unuo de elektra resistanco (R)
Laŭ P.I.V. la sovaĝa estas nesindikata (R) Kvalito
7- Tradicia rakonto pri la dioj (R) - Sin deteni de io plezuriga (R)
8- Ilo de lignaĵisto
9- Kopiu - Granda kvanto (R)
10- Livogira sukero (R) Daure esti (R)
11- Sufikso - kolekto de dokumentoj
Inverse: Brita mezurunuo de pezo
12- Planedo - Falfolia arbo kiu provizas mannaon



R. Raynaud (1978)

## Vertikale ❋

1- Ili estas pli afikaj ol viaj dentoj kaj malpli riskaj
2- Jeti amdeziran rigardon - Tiu de Festeno estas taŭge elektita (R)
3- Senĝena birdo (R) - Eluzi (R)
4- Fonetike teksaĵo - Aluvjo (R) - Ne ĉiam eblas en kartludo
5- Rilata al Skandinava monero - Peco da ligno aŭ da ĉokolado (R)
6- Kverko - Numerala adverbo
7- Helena profesoro pri filosofio kaj retoriko (R) - Inverse bela floro (R)
8- Malutila mamuleto (R) - Subite senti emocion antaŭ surpriza netutima aŭ danĝera okazaĵo (R)
9- Ŝati brandaĵojn (R) - La tuto de laboriloj.
10- Adverbo - Varma delikateco de koro
11- Stulta admiro kaj imito - En konsilantaro
12- Siglo de esperanta organizo - Konvena (R)


❋ - (R) nur radiko

Solvo de la krucvortoj aperinta sur la N-66


| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| B | L | A | N | K | I | G | I | S | T | I | N |
| R | I | K | O | L | T | I | ● | I | U | ● | E |
| O | G | I | V | O | ● | N | A | T | A | L | I |
| K | A | R | ● | S | T | E | L | U | L | I | N |
| A | T | ● | S | T | R | A | T | ● | E | S | T |
| N | U | F | A | R | O | ● | O | S | T | ● | E |
| T | R | I | K | O | T | ● | ● | I | O | ● | L |
| I | O | ● | S | F | I | N | K | S | ● | F | I |
| S | ● | F | I | O | L | ● | ● | M | E | R | G |
| T | I | R | ● | B | O | K | S | ● | ● | A | E |
| E | N | O | ● | I | ● | U | K | R | A | J | N |
| J | A | K | T | O | ● | L | I | G | N | I | T |

# KRUCVORTOJ


# 5 minutoj de paùzo




*Estu klare Mario, nur dum niaj foriroj vi rajtos ordoni hejmen !*




*SEN VORTOJ*



*Tamen mi ripetis plurfoje ke ni ne havus lokon por via patrino. . .*



*Nun, vere la nova sekretariino troigas.*



*SEN VORTOJ*



*Mi ne komprenas en aliaj tempoj la kravatoj estis faritaj tute rektaj !*

FRANCA ESPERANTO - INSTITUTO
INSTITUT FRANCAIS d'ESPERANTO
LANGVEDOKO - RUSILJONA FEDERACIO

LERNEJA JARO 1977 / 1978
SUKCESOj EN LA EKZAMENOJ

### ATESTO PRI LERNADO

BALOUET Jeanne (B)
CHAUDOUARD Fernande (B)
DENNEBECQ Kaja
DURANDEU Renaud
GOUZY Christine
LUBET-FUCHS Claire
URBAL Marta

### ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO

BELLOTTO Jeannine ( B)
DAVID Magali (B)
DENNEBECQ Kaja (B)
ENSUQUE Louis (TB)
GRAND Madeleine (TB)
SOULIER Ginette

### ATESTO PRI KAPABLECO

COQUIN Roger

x-x-x-x-x-x-x-x-x

RIMARKOJ La nombro de la kandidatoj estas relative kontentiga, sed la nivelo iom meza, ĉefe en la A. pri Lernado.
Eble la Federacio povus antaŭvidi aranĝon de konkurso por stimuli la gelernantojn al kandidatiĝo ?

La Direktorino de la Ekzamencentro :
Jeannine VINCENT

.§.§.§.§.§.§.§.§.§.§.§.

## VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Bedaŭrinde nia venontjara federacia kongreso ne povos okazi je la antaŭviditaj datoj ( 28-a kaj 29-a de aprilo), ĉar ĝuste tiutempe okazos la nacia kongreso, verŝajne en LILLE .

La plej oportunaj datoj por nia federacia kongreso en MENDE eble estos la 14-a kaj 15-a de aprilo (xxxxxxxxxxxx)(Pasko) tiel ke restos ankaŭ la 16-a de aprilo (paska lundo) por tiuj kiuj deziros plilongigi sian restadon.

Konfirmo aperos en la sekvonta kajero de S.F.S.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-
!-!-!-!-!

### NOVA KURSO , NOVA GRUPO ....

Post la prelego de René Llech-Walter, Prezidanto de la Federacio "Langvedoko - Rusiljono" , en Argelès s. Mer (Orientaj Pireneoj), nova grupo naskigs en tiu urbo kaj malfermo de kurso estas antaŭvidita dum Novembro 1978 .

La estraro de la grupo konsistas el S-ino TOMASINI , 17 bis, Route de la Mer 66700 ARGELES sur MER , S-ro LAGOUTTE, Hameau du Soleil, same kaj S-ro POUCHOL, 2 Rue du Travail , same.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-
!-!-!-!-!-!

### LINGVA RUBRIKO

1e) PRI LA REFLEKSIVO :

En ĉiuj sinsekvaj eldonoj de la Fundamento - ĉiuj subskribitaj de Zamenhof - oni povas legi :

" Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li".

Niaopinie, laŭ la de Z...mem preskribitaj gramatikaj reguloj, ne devus esti li, sed si ĉar, kiel supre dirite, tiu li troviĝas en ĉiuj eldonoj senescepte, ne povas temi pri preseraro, sed nur pri gramatika eraro .

....../.....

Gramatika eraro subskrita de Z.. en la plej oficiala zamenhofa dokumento estas io tre malfacile akceptebla.
Ni mem do sendube eraras. Kiu povas solvi ĉi angoran problemon ?
Oni povus sendube ĝin solvi redaktante la kulpigitan frazon tiele :
" Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esp. rigardadis ĉiam, kiel se ili estus leĝoj por li ".
Sed restas la zamenhofa redaktado...

2e) PRI LA IMPERATIVO :

Tiu verbomodo estas fundamenta. Ĝi ja troviĝas en la sesa gramatika regulo. Sed ĝi fakte tute malaperis el la nuntempaj lernolibroj.

Oni ĝin anstataŭigis, unue per imperativo-subjunktivo (kvankam tiu subjunktivo tute ne ekzistas en la Zamenhofa gramatiko), kaj nun per volitivo.

Nin interesus ekscii, kiu gramatikisto enirigis tiun novan verbomodon en niajn gramatikojn, sin permesante forstreki el la Zamenhofa gramatiko la fundamentan imperativon.

Krom la nomo de tiu gramatikisto (eble K. Kaloscay), nin interesus ekscii en kiu dokumento kaj je kiu dato estis publikigita la naskiĝo de volitivo.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-
!-!-!-!-!-!-!
!-!-!-!-!

# En konfesejo

Revenante hejmen je la fino de l'posttagmezo, la juna Karlo ekvidis tra duonaperta fenestro de l'gepatra dormoĉambro, sian patrinon tre intime ligitan al de li nekonata viro.

Li intence brue krakigis la hejman enirpordon kaj havis sufiĉe da tempo por vidi la nekonatan viron sin ĵeti en grandan murŝrankon.

Unu horon poste alvenis el laborejo la patro de Karlo.

La juna Karlo, kiu dume multe pripensis tiun delikatan aferon, profitis la tempon dum kiu sin duŝis lia patro, por diskrete malfermi la ŝrankon, kaj diri al la nekonatulo :

" Mia urseto konsilis al mi, ke mi venu al vi por peti de vi 500 frankojn por ke ĝi povu aĉeti biciklon. Se tion vi ne konsentos, aldiris mia urseto, ĝi ĉion rakontos al paĉjo."

Kaj vole-nevole, la enŝrankiĝinto elpoŝigis la 500 frankojn.

Post vespermanĝo, la tuta familio enlitiĝis, kaj la nekonata fuĝis dum la nokto.

Sed la konscienco de Karlo ne estis trankvila, li tre malbone dormis, li sonĝis pri diablo kaj pri infero.

Ellitiĝinte frumatene, li decidis iri al la plej proksima preĝejo por sin konfesi.

Ekgenuiĝinte en la konfesejon, li aŭdis afablan voĉon flustri al li :

" Mi vin aŭskultas, filo mia ".

Kaj Karlo ekparolis : "Mia urseto konsilis al mi, ke mi venu al vi por..."

La afabla voĉo lin brutale interrompis tondrante je liaj oreloj ;

" Sed, fulmotondro, vi sendube ne aŭdacos denove friponi min je 500 frankoj §!!"

Esperantigis GOSO

# Grava atentigo

La E-Grupo de Nimo estas dankema al D-ro SALAN, kiu havigis ĉambron en Kultura Centro Pablo Neruda. Kie, ni regule kunvenas ĉiumerkrede je la 16-h. ĝis la 19-h. Oni invitas la gesamideanoj viziti nin. Ili estas kore akceptataj.

*Okaze de la Jarfinaj Festotagoj, ni esprimas niajn Sincerajn Bondezirojn al Legantoj kaj Simpatiantoj.*

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES
Dépot Légal : 4me Trimestre 1978
Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes